



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 9-a de Aprilo 2018

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Ŝlomo Ŝaĥar, Asaf Ĥefec, Dror Gaon, Eran Vodevoz, Mikaelo Lineckij, Gabi Zeevi

Protokolo de la antaŭa kunsido (5-a de marto 2018) – publikigita en la retejo.

1. Raportoj (Amri)

- a) Aperis informo pri la E-kurso en TA en la aprila n-ro de Revuo Esperanto (Kalejdoskopio).
- b) Detalaj artikoloj aperos en la maja n-ro de Revua Esperanto kaj en la IPR-informilo.
- c) Aperis novelo pri Lidia Zamenhof kaj Itamar Ben-Avi en Haarec. Amri kontaktis la aŭtoron (Prof. Joni Mizraĥi), kiu permesis traduki en E-on kaj publikigi en IE. La profesoro serĉas la kontakton inter Ben Jehuda kaj Zamenhof, esperas trovi ion pri Lidia ĉe la Bahaanoj.
- ĉ) Amri komencos la prelegserion "Nicocot" en Modiin, la 13-an de aprilo. Eran komencos en Ganei Tikva fine de aprilo (por la 7-a, 8-a kaj 9-a klasanoj).
- d) Israela partopreno en la lisbona UK: ĝis nun 11 personoj (Jehoŝua).
- e) Dror akceptis esti la israela salutanto. Li devos ricevi la koncizan tekston, menciante la venontjaran IK-n.

2. Esperanto-kurso en Tel-Avivo - (Doron, Amri)

- a) 36 personoj venis en la unua renkontiĝo, 32 pagis kaj lernas plu.
- b) La plimulto (ĉ. 20) venis pro la anonco en "Galeria" de "Haarec".
- c) Amri reklamis per Facebook por 500 ILS, 7 tagojn; ĉ. 5,500 personoj estis atingitaj. De ĉio ĉi ni povas lerni pri la elspezo kaj efikeco - por la venonto.
- ĉ) Seĝoj: en la unua renkontiĝo seĝoj estis pruntitaj el la aŭlo kaj diversaj salonoj en WIZO, en la dua Amri kunportis 16 seĝojn, sed ne eblis lasi ilin en la klubejo. Antaŭ la tria leciono Jehoŝua petis de Efrati pliajn seĝojn, kaj sekve nun estas ĉ. 35, - de WIZO mem.

3. Financoj, buĝeto 2018 (Ŝlomo)

Ŝlomo disdonis la korektitan printitan buĝeton por la 2018-a jaro, kaj ankaŭ la komparon inter la buĝeto kaj la realigo por la unua kvarono de 2017. La estraranoj petis kaj ricevis klarigojn, detaligojn por kelkaj punktoj. Elstaras, ke nia investo gajnis malmulte, nur ĉ. 1.5%, kaj temas pri sufiĉe granda kapitalo. Decido: *Eran esploras kaj zorgos pri pli bonaj kanajloj de investo* (unuanime aprobita).

4. Proponoj de Mikaelo (kartludo, klubejo, IK)

- a) Propono: eldoni broŝuron por kursfinintoj, en 30-40 ekzempleroj. Respondo: devas demandi al Doron pri la eventuala interesiĝo.
- b) Kultura programo dum la IK en Akko: Mikaelo pretas gvidi la tutan artan programon – la koncertojn (Enrika, Ĵomart kaj Nataŝa), kaj proponas ĉ. 3 amuzajn dialogojn inter la

2/...



koncerteroj (kun Elvir, Enrika kaj Jehoŝua). Cetere - Jehoŝua prelegos en E-o.

c) Uzo de ludoj dum la kursoj: mankas ankoraŭ personaj detaloj pri elstaraj israelaj E-istoj. (Jehoŝua promesas liveri ilin telephone al Mikaelo).

5. La 18-a IK en Akko 3-5 de majo, 2018 (Amri)

a) Ĝis la limdato por nuligi (22/3) ni rezervis 10 ĉambrojn (8 dulitajn, 2 unulitajn) kaj ankoraŭ ĉ. 10 personoj venos sen tranokto. Ni atendas ĉ. 20 partoprenantojn.

b) Amri nuligis la kromajn ĉambrojn, sed ricevis permeson teni 2 pliajn ĝis la 12/4. (Ĉu Judit Epŝtein povos aliĝi? – ankoraŭ ne certe).

c) Ekskursoj: vendrede en Hajfa – matene Bahaaj Ĝardenoj, kunordigita de Jehoŝua inter 10-11, sekve la japana muzeo Tikotin. Transportado: aŭtoj kaj publika. Sabate: Akko piede.

ĉ) Eksterlandanoj - ĝis nun nur Ĵomart kaj Nataŝa; ili aliĝis al ambaŭ ekskursoj, antaŭ-IK (3/5) kaj post-IK (6-10/5).

d) Buĝeto – estimata enspezo: 2,000 ILS de kotizoj (20x100 NIS). Repago al la artistoj: ĉ. 4,000 NIS por flugoj, kaj pliaj 1,000 NIS por gastejo.

e) Parta kotizo: Decido: *por unutaga partopreno la persono pagos 50 siklojn* (anstataŭ la plena pago, 100 sikloj).

6. Israela Esperantisto - Antaŭ la IK aperos la duobla n-ro 164-5 (2017 vintro/2018 printempo). La intenco estas disdoni ĝin dum la IK en Akko. Espereble, la venontan numeron redaktos jam Mikaelo, li povas jam komenci kolekti la materialon. Amri ankoraŭ helpas pri la engaĝigo, kaj akompanos lin laŭnecese.

7. Yagil - advokata letero (Amri, Eran)

Amri interkonsentis kun adv. Ran Modan sendi tekston por ke li konsilu. Sekve estis interkonsentite ke Eran prizorgu la aferon. Amri sendis la tekston al Eran por kontrolo antaŭ unu semajno. Eran decidu kiu estas pli efika, ĉu adv. Ran Modan aŭ adv. Morag?

8. Juraj aferoj kaj ejo - Dratverejo (Jehoŝua, Eran), Oficejo (Ŝlomo).

a) Ŝlomo: neniu volas vendi en TA por tia sumo (ni povus pagi ĝis ĉ. 900 mil siklojn).

Ŝlomo ofte esploras ĉe 15 agentoj. Amri: serĉi en Yad-2. Decido: *serĉi plu, ev-e en Yad-2*.

b) “Tama 38”: ni ankoraŭ ne subskribis ĉe la advokato, sed li jam delonge ne kontaktis nin, eble jam estas sufiĉe da subskriboj. Jehoŝua demandos pri tio.

La venontaj kunsidoj: la 14-a de Majo, 11-a de Junio, 9-a de Julio/ 2018, 19:30

Protokolis: Gabi Zeevi